
FORUMO n–ro 141 (4 / 2008)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# Sean Penn, revigu nin !




## Enhavo:

Survoje al la 30-jara jubileo de L.S.G. 3
La nove elektita prezidanto de HEF 3
Okazis ĉe Unuiĝintaj Nacioj ! 4
La GLAT-rajtoj en la agendo de Obama 6
La historio de Harvey Milk nun en filmo 8
La plej bona germana stangosaltistino nun estas viro 9
Notice – Diverse 11

**L S G -**
**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org

adreso: la sekretario (vidu sube)

membriĝo: ĉe la sekretario

kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

Prezidanto fsoghomonian (at) yahoo.fr

Sekretario lasekretario (at) gmx.net

Kasisto lakasisto (at) gmx.net

Estraranoj
arvimide (at) earthlink.net
phsb (at) orange.net

Retejo randy.dean (at) pobox.com

**FORUMO 141**

**Membrogazeto de la LSG ( 4 / 2008 )**

adreso: la sekretario (vidu supre)

redakcio: laredaktanto (at) gmx.net

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro, ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

! *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

**Limdato por FORUMO 142:** 2009-03-20

## Forumo en grava malfruo

Karaj legantoj,
Tiu ĉi numero alvenas al vi jam en 2009 longe malfrue kompare kun la antaŭvidita tempo, ni sincere pardonpetas.
Nia unua plano estis raporti pri la monda situacio de la aidosa malsano, pro la proksimeco al la 1a de decembro, monde dediĉita tago por atentigo kontraŭ aidoso. Sed la paso de semajnoj konvinkis nin komenci jam la festadon de la 30-jariĝo de nia asocio. Rakonto pri la fruaj tagoj ankoraŭ mankas, kaj ni sopiras al la altvalora laboro de nia estrarano Harry.
Krom tio, ni ŝatis doni al vi esperigajn novaĵojn, ekzemple pri la diskuto pri nekriminaligo de samseksamo ĉe UN kaj pri la nove aperinta filmo de Gus Van Sant pri Harvey Milk.
Sed estas novaĵoj pri la GLAT-temoj ankaŭ pro la elekto de Barack Obama nova prezidanto de Usono. La influo de Usono en la mondo estas tiom forta, ke tiu okazaĵo, kune kun la diskuto ĉe UN, ŝajnas prilumi per alia koloro la estontecon de gesamseksemuloj tra la mondo. Ni tiom, almenaŭ, atendas plenespere.

*Maŭro kaj Juanjo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigitaj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendita al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesubskribitaj artikoloj estas de la redakcio.*

# Survoje al la 30-jara jubileo de L.S.G.

*Nia asocio, Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, estis fondita en la jaro 1979.*

En la lasta numero de Forumo, mi anoncis, ke mi, kun kelkaj laborantoj, preparas libreton pri la fruaj tagoj de LSG por festi la 30an jariĝon de LSG – per tiu libreto mi intencas raporti pri la komenco de nia historio, rakontoj kaj interesaj anekdotoj pri la fondintoj, ties kialoj por fondi LSG kaj ties unuaj renkontiĝoj. Malgraŭ tiu peto por pli da informo de la legantoj de Forumo de LSG, mi tamen ricevis malmultajn informojn sed spite al tiu manko de informo, mi kaj miaj kunlaborantoj trovis kelkajn personojn, kiuj ja havas interesajn rakontojn por ni kaj mi jam intervjuis tiujn homojn kaj en Britio kaj Francio kaj mi eĉ ricevis kelkajn interesajn fotografaĵojn de la unua renkontiĝo. Mi ankaŭ trakribris kelkajn arĥivejojn kun la afabla helpo de nia prezidanto, Francis Soghomonian, kaj eltrovis kelkajn fruajn raportojn, anoncojn ktp pri LSG en landaj kaj internaciaj gazetoj kaj mi eĉ trovis iun, kiu havas la tutan kolekton de Forumo ekde la unua ekzemplero, kiun mi intencas viziti en la nova jaro por fotokopii tiujn rarajn kaj gravegajn dokumentojn.

Sed mi bezonas akoraŭ pli da fontoj kaj informoj por la projekto kaj ankoraŭ restas tempo, se vi deziras partopreni en ĉi tiu projekto: ĉu informo, ĉu rakontoj, ĉu fotografaĵoj, ĉu raraj dokumentoj kaj simile, nepre kontaktu min ĉe la retadreso, kiun mi donas je la fino de ĉi tiu artikoleto. Se vi loĝas en Eŭropo kaj pretas esti intervjuita, mi pretas vojaĝi al vi por fari tiun intervjuon ! Se vizito ne konvenas (kaj jes, mi devas konfesi, ke enestas deziro en mi vojaĝi iomete kaj vidi pli da Eŭropo eĉ pli de la Mondo) mi povas aranĝi intervjuon pere de SKYPE aŭ per telefono.

Kompreneble, multaj el niaj membroj preferas resti anonimaj, kaj mi respektos tiun privatecon. Se vi volas kontribui sed ne volas esti menciita en la libro pernome, mi ne aperigos vian nomon – sed se vi volas uzi plumnomon, tio estas alia afero.

Harry Barron (Estrarano)

Bonvolu kontaktu min ĉe:
healingcymru@gmail.com
aŭ per SKYPE: phsb66
Vi ankaŭ trovos min ĉe Facebook kaj Ipernity pere de mia nomo: Harry Barron (Wales)

# La nove elektita prezidanto de HEF

Dum la pasinta Hispana Kongreso kiu okazis en Kuenko, dum la somero, nia samideano Arturo Jiménez estis elektita prezidanto de la Hispana Esperanto Federacio (HEF). Li naskiĝis en la jaro 1976 kaj esperantistiĝis en 2002. Magistro pri Araba Filologio kaj Diplomito pri Historio, en Reĝurbo kun aliaj samideanoj fondis Esperantista Manĉa Asocion. Ni gratulas lin.

# Okazis ĉe Unuiĝintaj Nacioj !

Senprecedencan venkon ĉe la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) ĉe la Novjorka UN-sidejo, la pasintan 18an de decembro dum sia 63a sesio, havis rezolucia propono, flanke de kelkaj landoj gvidataj de Francio, por enkomprenigi en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj ankaŭ la nediskriminacion surbaze de seksa orientiĝo (samseksemo) aŭ genra identiĝo (transsekseco).

Malgraŭ la kontraŭaj argumentoj de landoj, kiel Ugando, Egiptio, Sirio, Rusio, Belorusio kaj Vatikano, la rezolucio ricevis porajn voĉdonojn de 66 landoj (*), kiu alvokis al la nekriminaligo de samseksemo, laŭ la fundamento de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies 60-jariĝon oni festis la 10an de decembro 2008.

Tie, la Alta Komisiito de UN pri la Homaj Rajtoj, Navanethem Pillay (en la foto), bedaŭris, ke tro multaj landoj plu kriminaligas seksajn rilatojn inter samseksaj konsentaj plenkreskuloj, kaj ke deko da ŝtatoj plu havas leĝojn, kiuj kondamnas al mortpuno samseksaman agadon. Ŝi diris en vid-mesaĝo:

«Kiuj estas lesboj aŭ gejoj aŭ ambaŭseksemaj, kiuj estas transseksuloj aŭ transgenruloj aŭ interseksuloj, tiuj estas plene kaj egale membroj de la homa familio kaj estas traktindaj kiel tiaj.



Navanethem Pillay

«La stereotipa ideo, ke ĉiuj estas egalaj, sed iuj estas pli egalaj ol aliaj, estas neakceptebla. Neniu homa estulo devus vidi neataj siajn homajn rajtojn simple pro sia seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo. Neniu homa estulo devus esti viktimo de diskriminacio, perforto, krimaj sankcioj aŭ mistrakto simple pro sia seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo.

«Ridinde estas, ke multaj el tiuj leĝoj, kiel ekzemple Apartismo en Sud-Afriko, kiuj kriminaligis seksajn rilatojn inter konsentaj plenkreskuloj el malsamaj "rasoj" estas fakte ruinoj de koloniisma pasinteco kaj pli kaj pli oni konsideras ilin anakronismaj kaj malkonformaj al la internacia leĝaro kaj al tradiciaj valoroj de digno, enakceptemo kaj respekto al ĉiuj.»

Kaj jen la proponita teksto. Ĝi estas vorte komplika, kiel ĉiuj "gravaj dokumentoj". Do estis komplika por la redaktantoj, traduki al Esperanto, sed espereble ĝi estas komprenebla:

1. Ni reasertas la principon de universaleco de la homaj rajtoj, tiel kiel sankciita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies 60-jara jubileo celebriĝas ĉi-jare, kaj kies 1-a artikolo proklamas, ke "ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj en digno kaj rajtoj";
2. Ni reasertas, ke ĉiu individuo rajtas je la homaj rajtoj sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato, tiel kiel decidite en la 2-a artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj en la 2-a artikolo de la Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj kaj en la 26-a artikolo de la Internacia Traktato pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj;
3. Ni reasertas la ne-diskriminacian principon, kiu postulas, ke la homajn rajtojn oni etendu al ĉiuj homoj sendepende de seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo;
4. Nin grave zorgigas la malrespekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj surbaze de seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo;
5. Nin zorgigas ankaŭ, ke la homoj de ĉiuj landoj en la mondo estas objekto de perfortoj, persekutoj, diskriminacioj, esceptoj, malaproboj kaj antaŭjuĝoj pro ilia seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo, kaj ke tiuj agoj endanĝerigas iliajn sekureco kaj digno;
6. Ni kondamnas ĉiun malrespekton de la homaj rajtoj surbaze de seksa orientiĝo kaj genra identiĝo, kie ajn tio okazas, kaj precipe ilian krimigon kiel mort-puno, senprocesaj aŭ maldetalaj aŭ arbitraj ekzekutoj, praktiko de torturo aŭ aliaj suferigoj, aŭ kruela, nehoma kaj sendigna traktadoj, arbitraj aresto aŭ malliberigo, kaj senigo de rajtoj financaj, sociaj kaj kulturaj, inkluzive de la rajto je sano;
7. Ni realvokas al la deklaro de 2006, eldonita fronte al la Hom-Rajta Konsilio flanke de 54 landoj, por peti de la prezidanto de la Konsilio doni ŝancon por diskuti pri tiuj malrespektoj dum oportuna estonta sesio de la Konsilio;
8. Ni gratulas la atenton tra specialaj proceduroj donitan al tiuj temoj de la Hom-Rajta Konsilio kaj de la subjektoj de la traktato, kaj kuraĝigas ilin daŭrigi konsideri, dum la plenumoj de siaj mandatoj, pri la malrespektoj de la homaj rajtoj surbaze de seksa orientiĝo;
9. Ni akceptas la adopton de Rezolucio AG/RES. 2435 (XXXVIII-O/08) pri "Homaj rajtoj, seksa orientiĝo kaj genra identiĝo" de la Ĝenerala Asembleo de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, eldonita dum la 38a sesio, la 3an de junio 2008;
10. Ni realvokas ĉiujn ŝtatojn kaj la plej grandajn organizojn protektadi la homajn rajtojn, kaj sindevigi al antaŭenpuŝado kaj protektado de la homaj rajtoj de ĉiuj homoj, sendepende de seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo;
11. Ni petegas la ŝtatojn alpreni ĉiujn necesajn, kaj aparte leĝajn aŭ administrajn, rimedojn por certigi, ke seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo ne povu esti, en nenia

okazo, kialo por efektivigo de punaj kondamnoj, precipe ekzekutoj, arestoj aŭ malliberigoj;

12. Ni petegas la ŝtatojn certigi, ke oni prienketu la malrespektojn de homaj rajtoj surbaze de seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo, kaj ke oni jure persekutu kaj respondecigu la kulpulojn;
13. Ni petegas la ŝtatojn certigi adekvatan protekton al la defendantoj de homaj rajtoj kaj forigi la obstaklojn, kiuj malebligas al ili antaŭenigi sian laboron pri la protektado de homaj rajtoj kaj lukto kontraŭ diskriminacioj pro seksa orientiĝo kaj genra identiĝo.

(*) : Albanio, Andoro, Argentino, Armenio, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Bolivio, Bosnio-Hercegovino, Brazilo, Britio, Bulgario, Centrafrika Respubliko, Ĉeĥio, Ĉilio, Danio, Ekvadoro, Estonio, Finnlando, Francio, Gabono, Germanio, Grekio, Gvineo Bisaŭa, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Israelo, Italio, Japanio, Kabo Verdo, Kanado, Kartvelio, Kipro, Kolombio, Kroatio, Kubo, Latvio, Liĥtenŝtejno, Litovio, Luksemburgio, Makedonio, Malto, Maŭricio, Meksiko, Montenegro, Nederlando, Nepalo, Nikaragvo, Norvegio, Novzelando, Paragvajo, Pollando, Portugalio, Rumanio, San Marino, Sao Tomeo kaj Principeo, Serbio, Slovakio, Slovenio, Svedio, Svislando, Timoro Orienta, Urugvajo, Venezuelo.

# La GLAT-rajtoj en la agendo de Obama

Dum sia balot-kampanjo, en 2007, Barack Obama, nun prezidanto de Usono, eldiris:



*« Kvankam ni longan vojon marŝis de post la tumultoj de Stonewall en 1969, ni devas ankoraŭ multe labori. Tro ofte la demandon pri GLAT-rajtoj ekspluatas tiuj, kiuj celas dividi nin. Sed en sia kerno tiu demando temas, pri kiuj ni estas kiel usonanoj. Ĝi temas pri tio, ĉu tiu ĉi nacio intencas vivi sur sia fundamenta promeso pri egaleco, traktante ĉiujn siajn civitanojn kun digno kaj respekto. »*

Oni povas tion legi en la oficiala retejo de la Blanka Domo (http://www.whitehouse.gov en la fako "the Agenda" – "Civil Rigths"). En ĝi estas skribitaj la celoj subteni la GLAT-komunumon, jene:

1. *Plivastigi kontraŭleĝigon de la "krimoj pro malamo"*: en 2004 krimoj kontraŭ usonaj lesboj, gejoj, ambaŭseksemuloj

2. kaj transseksuloj, konsistigis la trian, laŭ grandeco, kategorion de krimoj. prezidanto Obama subtenis leĝofaradon, kiu plivastigus juĝpovon inkluzivante perfortajn malamajn krimojn faritajn pro raso, haŭtkoloro, kredo, nacia origino, seksa orientiĝo genra identiĝo aŭ fizika handikapo. Kiel senatano, prezidanto Obama aprobis striktan leĝaron kiu igis malamajn krimojn kaj konspiron kontraŭleĝaj agoj.
3. *Batali diskriminacion en laborlokoj*: prezidanto Obama subtenas la Ne-Diskriminacian Dungan Akton [1], kaj kredas ke la usonaj kontraŭ-diskriminaciaj leĝoj pri dungo devus inkluzivi seksan orientiĝon kaj genran identiĝon. Dum kreskanta nombro da dungitoj ĝuas inkluzivajn avantaĝojn por siaj hejmaj partneroj, diskriminacio surbaze de seksa orientiĝo en la laborlokoj okazas sen iu ajn federacia jura rimedo. La prezidanto ankaŭ subtenis leĝodonadon en la senato de Ilinojo, kiu forpelus dungan diskriminacion surbaze de seksa orientiĝo.
4. *Subteno de plenrajtaj Civilaj Partnerecoj kaj federaciaj rajtoj al GLAT-paroj*: prezidanto Obama subtenas plenrajtajn civilajn partnerecojn kiuj donas al la samseksaj paroj leĝajn rajtojn kaj privilegiojn egalajn al tiuj de geedzaj paroj. Obama ankaŭ kredas, ke necesas malvalidigi la Geedzecan Defendan Akton[2] kaj promocii leĝaron kiu certigas la pli ol 1100 federaciajn leĝajn rajtojn kaj avantaĝojn nuntempe provizatajn pro geedzeco, etendiĝi al samseksaj paroj en civilaj partnerecoj kaj aliaj leĝe rekonitaj unuiĝoj. Tiuj rajtoj kaj avantaĝoj inkluzivas la rajton asisti amaton en okazo de urĝeco, la rajton je egala san-asekuro kaj aliajn labor-avantaĝojn kaj posedaĵ-rajtojn.
5. *Kontraŭstaro al Konstitucia forpelo de sam-seksa edzeco*: prezidanto Obama voĉdonis kontraŭ la federacia amendo pri geedzeco en 2006, kiu difinus geedzecon nur inter viro kaj virino kaj malebligus juran plivastigon de geedzo-similaj rajtoj al samseksaj aŭ aliaj negeedziĝintaj paroj.
6. Malvalidigo de “Don't Ask - Don't Tell”[3] (Ne Demandu – Ne Priparolu): prezidento Obama samopinias kiel la antaŭulo de la Stabestraro [4] John Shalikashvili kaj aliaj armeaj fakuloj, ke necesas malvalidigi la politikon de “ne demandu – ne priparolu”. La determinanta testo por armea servo devus esti patriotismo, sento je sindevigo kaj plenvolo servi. Diskriminacio devus esti mal–permesita. La usona registaro elspezis milionojn da dolaroj anstataŭigante taĉmenterojn forpelitajn de la armeo

[1] Leĝo-propono al la Usona Kongreso (la federacia parlamento), kiu malebligus al dungisto maldungi laboriston surbaze de seksa orientiĝo aŭ genra identiĝo.

[2] Tiu leĝo-propono efikus, ke neniu ŝtato estus devigata trakti rilatojn inter sam-seksaj homoj kiel geedzecon, eĉ se ĝi estas konsiderata geedzeco en alia ŝtato, kaj same por la Federacia Registraro.

[3] Tiu principo, valida en la usona militistaro, malpermesas al samseksemulo aŭ ambaŭseksemulo malkaŝi iel ajn sian seksan orientiĝon, tiel kiel al superuloj iniciati enketon pri tio.

[4] La grupo de la plej altgradaj estroj de ĉiu usona armeo.

7. pro ilia seksa orientiĝo. Krome, pli ol 300 lingvaj kleruloj estis maldungitaj laŭ tiu politiko, inkluzive de pli ol 50 flue parolantaj la araban. La prezidento laboros kun armeaj estroj por malvalidigi la nunan politikon kaj certigas ke ĝi helpas konformiĝi al la naciaj celoj pri defendo.
8. *Etendi rajtojn je adopto*: prezidanto Obama kredas, ke oni devas certigi rajtojn je adopto al ĉiuj paroj kaj individuoj, sendistinge de ilia seksa orientiĝo. Li opinias, ke infano ĝuos avantaĝon en sana kaj amoplena domo, ĉu la gepatroj estas gejaj aŭ ne.
9. *Promocii preventadon kontraŭ aidoso*: dum la unua jaro de sia prezidanteco, prezidanto Obama disvolvigos kaj komencos pligrandigi ĝeneralan nacian strategion pri aidoso/HIV, kiu inkluzivas ĉiujn federaciajn agentejojn. La strategion oni modlos por redukti HIV-infektojn, plivastigi la aliron al sanrimedoj kaj redukti malegalecon pro HIV-malsaneco. La prezidanto subtenos komun-sencajn alfrontojn inkluzive de laŭ-aĝa seksa edukado kiu enkomprenas informojn pri kontraŭkoncipaj rimedoj, lukti infektadon inter la malliberuloj per edukado kaj preventado, kaj disdonado de kondomoj tra la publika san-sistemo. La prezidanto ankaŭ subtenas pligrandigon de la federacia kontraŭstaro al la interŝanĝo de injektiloj, kiuj povas draste redukti la kvanton de infektiĝoj inter droguloj. Prezidanto Obama ankaŭ celigis alfronti la hontigadon – tro ofte proksima al homofobio – kiu daŭre ĉirkaŭvolvas HIV / aidoson.
10. Plipotencigi virinojn por preventi aidoson: en Usono la procentaĵo de virinoj kun aidosa diagnozo kvarobliĝis dum la lastaj 20 jaroj. Hodiaŭ, virinoj kvantas pli ol kvarono el ĉiuj novaj HIV/aidosaj diagnozoj. Prezidanto Obama enkondukis la Mikrobicidan Disvolvan Akton, kiu akcelos la disvolvadon de produktoj, kiuj plipotencigas virinojn batali kontraŭ aidoso. Mikrobicidoj estas aro de nuntempe disvolvataj produktoj, kiujn virinoj lokume aplikas por preventi transdonadon de HIV kaj aliaj infektoj
11. .

# La historio de Harvey Milk nun en filmo

H. Milk transloĝiĝis en San-Francisko el Nov-Jorko en 1972 kiel multaj aliaj gejoj dum la '70aj jaroj, kiuj popolis la kvartalon Castro [kastro] de la urbego.

Li profitis el la kreskanta politika kaj ekonomia povo de la kvartalo por promocii siajn interesojn, kaj trifoje konkuris pri politika ofico, sed ne venkis.


Lia stilo dum la kampanjoj, tamen, akirigis al li pli kaj pli da populareco, ĝis li sukcesis gajni postenon kiel urba

konsilanto en 1977, enkadre de pli vastaj sociaj ŝanĝiĝoj en la urbo (en la foto en paĝo 8, de la aŭtoro Crawford Barton, li eldiras sian "paroladon de espero" ĉe la Geja Libereca Tago en San-Francisko en 1978).

Dum 11 monatoj li oficis, kaj danke al li pasis urba leĝo pri nediskriminaciigo de samseksemuloj.

Sed la 27an de novembro 1978 li kaj la urbestro George Moscone estis murditaj de Dan White, alia urba konsilanto, mem demisiinta pro malkonsentoj sed petanta reenpostenigon de la urbestro.

Post la unua dokumenta filmo "La Tempoj de Harvey Milk" de Rop Epstein en 1984, farita subaze de la biografia libro de Randy Shilts en 1982, la tuta



okazaĵaro estis en 2008 denove scenigita de la fama reĝisoro Gus Van Sant (en la foto, ĉi supre) kun Sean Penn kiel ĉefrolulo en la persono de Harvey Milk.

## La plej bona germana stangosaltistino nun estas viro

Yvonne Buschbaum estis elstara germana atleto, kiu brilis en Olimpikaj Ludoj, Mondaj kaj Eŭropaj, sed ŝi havis gravegan problemon, ĉar ŝi estis "viro en korpo de virino", laŭ sia propra konfeso. Ŝi operaciiĝis nun, tra hormona kuracado kaj ŝi sanĝis sekson.

Ŝi diris en la fino de la pasinta jaro: "de longa tempo mi sentas min en fremda korpo kaj kiu konas min, tiu vidas tion tute klare kiel mi. Mi estas viro en korpo de virino".

Nun li estas viro en korpo de viro. Yvonne operaciiĝis, havas vir-seksajn organojn kaj provizas al si sufiĉan testoteronon por ke ŝia aspekto ŝanĝigis esence. Nun li jam ne nomiĝas Yvonne, sed Balian, kvankam en la komenco pensis nomi sin Ivan.


La operacio estis farita en Potsdam (Germanio) kaj la eks-stangosaltistino montriĝis tute feliĉa post la operacio. "Hodiaŭ mi vekiĝis en kompleta libero; la ĉielo estas malfermita", li skribis en sia retpaĝo (www.pole-it-buschbaum.de) esprimanta la novajn

sensaĵojn post sia komplika pasado tra la operaciejo.

"Mi estas fluganta sur miaj nuboj de libereco kaj baldaŭ mi surteriĝos. Mi ricevas nekredeblan nombron da demandoj en mia retpaĝo, sed mi ne povas, nek volas respondi al ĉiuj", li diras en la hospitalo en kiu li estas.

altas 1,77 metrojn, pezas 55 kilogramojn kaj havas brilantan karieron en virina stangosalto, la plej bona inter ĉiu ajn germana atleto en tiu fako, kavankam li ne atingis la rekordon en sia lando.

Kiam ŝi anoncis, ke ŝi iros ŝanĝi sin al viro, jam diris ke ŝi rezignas por ĉiam al atletismo. Nun li certe neniun




Lia antaŭa trejnisto, Herbert Czingon, kiu estas la teknika direktoro de la Germana Federacio, vizitis Balian en la hospitalo. "Li ankoraŭ estas malforta, sed li povas ellitiĝi, kaj baldaŭ oni donos al li la elirpermesilon", li diris al la ĵurnalistoj. La eks-stangosaltistino decidis ne koncedi intervjuojn.
Yvonne/Balian Buschbaum naskiĝis la 14an de julio 1980 en Ulm (Germanio),

sporton povas praktiki profesie, ĉar li estus pozitiva je testosterono. Li komencis injekti ĝin al si la 20an de novembro 2007 ("tie estis la komenco de mia nova vivo", li diris) kaj li submetis sin al longa kuracado per viraj hormonoj, antaŭ la operacio por transiri de virina al vira sekso.

# Notice – Diverse


Vi ĉiuj scias, ke ekde 2005 en Hispanio sam-seksaj paroj rajtas edziĝi (edziniĝi, se virinoj), sen iu ajn distingo disde la malsam-seksaj paroj.




La Hispana Reĝino, Ŝ.R.M. Sofia de Grekio *(en la foto, fonto: Agência Brasil sub licenco Krea Komunaĵo)*, princino de Grekio kaj Danio, en la libro de la ĵurnalistino Pilar Urbano pri la vivo de la reĝino, deklaris ke "ŝi rekonas la rajton de gejoj edziĝi, sed ke ili ne nomu ĝin geedzeco. Se tiuj homoj volas vivi kune, vesti kiel fianĉoj kaj edziĝi, ili povas laŭ sia rajto, aŭ ne, laŭ la leĝoj de sia lando: sed tion ne nomu geedzeco, ĉar ĝi ne estas."

---


Intervjuita de la itala klaĉ-revuo Chi [Ki], la futbalisto Fabio Cannavaro [Fabjo Kanavaro] (en la fotoj), kiu nun estas arierulo de hispana teamo Real Madrid, esprimis sian kontraŭecon al la



geja kaj lesba edziĝo, laŭleĝa en Hispanio: «Hispanio iras bone», li asertis, «kaj investis en la renovigo de la grandaj urboj.».

Kaj pri la geja edziĝo? «En tiu temo, mi estas pli itala.» Signifigante, per tio, ke li kontraŭas, laŭ la starpunktoj de la rom-katolika eklezio vaste sekvataj ankaŭ de la italia politikistaro.

Ne kontentaj per tiuj fierecaj deklaroj, la italaj samseksemuloj aŭdis plian, de la selektisto de la itala nacia teamo Marcello Lippi [marĉelo lipi] (en la foto [5] en paĝo 12): «Mi ne malakceptus iun en la nacia teamo nur pro lia seksa



[5] Aŭtoro Paul Blank el www.postproduktie.nl



orientiĝo... Laŭ tio, kio karakterizas la futbalistojn, tiun situacion estus vere komplike pritrakti», sed de la "alteco" de sia sperto «Mi ne kredas, ke estas gejaj futbalistoj, aŭ almenaŭ dum kvardekjara kariero mi neniam eksciis pri ili. Eblas, tamen, ke iu havas tiun emon, sed li ne rondiras por sciigi tion.»


---




La pasintan majon la prezidanto de Gambio, Yahya Jammeh, anoncis kampanjon kontraŭ la samseksemulojn («Ni estos pli severaj ol en Irano»). Dirite - farite, la pasintan decembron oni arestis en la flughaveno nederlandan 79-jarulon pro "maldecaj agoj" faritaj kun gambiaj viroj.

Li povis pagi monpunon por liberigi sin de la kondamno je du-jara karcero, laŭ la gambiaj leĝoj, certe danke al sia eŭropa civitaneco. Solvo supozeble ne praktikebla de gambia gejo...

---




La faman filmon *Brokeback Mountain* de la reĝisoro Gus Van Sant elsendis la itala ŝtata televid-kanalo RAI2 la 8an de decembro 2008 je malfrua horo (pro la protokolo pri protektado de infanoj), sed sen ĉiuj amoraj scenoj, "fortonditaj" de mistera cenzuro.

La postan tagon la direktoro de la kanalo deklaris, ke ili ne sciis pri la fortonditaj scenoj, kaj promesis denove enmeti la fimon en la program-tabelon.
Ni atendadas tiun realigon.